

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = cendoj 75
= frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1.50.

Pago por anoncoj:

15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

III:a jaro.

Aprilo 1898.

N:o 4 (28).

Hungarujo estas nia.

El Hungarujo ni ricevis eksterordinare bonajn sciigojn. La historio de Esperanto en tiu ĉi lando estas ligita kun la nomo de la ĵurnalisto A. Barabás en Koloĵvár. *) En Majo de la lasta jaro li aŭdis unue pri nia lingvo per la granda lingvisto d-ro Gabrielo Bálint, profesoro de universitato, kaj de tiu ĉi tempo li energie laboris por la bono de Esperanto.

La unuan artikolon pri Esperanto li skribis en sia tag-gazeto "Ellenzék", kiu estas la plej granda ĵurnalo de la urbo Koloĵvár. De tiu ĉi tempo li skribis ĉirkaŭe 50—60 artikolojn en sia gazeto, por la disvastigado de la lingvo Esperanto.

La ideo de la lingvo internacia plaĉis al multaj homoj; sed oni ne havis gramatikon. Gramatikon iu devus skribi — diris la homoj. Sed kiu? Oni povis timi, ke, se unu nekonata verkisto skribus la gramatikon, kaj farus la propagandon — tiu ĉi nur malhelpus al la afero. Multaj ĉefurbaj gazetoj estis, al kiuj ne plaĉis la ideo; tiuj ĉi farus nur mokon el la lingvo internacia Esperanto. Tiun ĉi fariĝon ankaŭ s-ro B. timis. La komuna opinio estis, ke devus fari la propagandon kaj ankaŭ skribi la gramatikon unu ĵurnalisto aŭ verkisto, kies nomo estas konata en la tuta lando. Tial s-ro B. decidis preni en siajn manojn la aferon de l' propagandado kaj ankaŭ la skribado de l' gramatiko.

Unue li skribis kelkajn artikolojn pri Esperanto, kaj estante en amikeco kun la redaktoroj de l' ĉefurbaj gazetoj, tiujn ĉi artikolojn ĉiuj redaktoroj presis tuj en siaj gazetoj, ankaŭ tiuj, al kiuj la ideo ne plaĉis.

La nombro de ĵurnaloj, kiuj presis la artikolojn, kaj faris la propagandon, estas ĉirkaŭe 300. En tiu ĉi serio estas politikaj tag-gazetoj, semajnaj ĵurnaloj, monataj ĵurnaloj, bel-literaturaj kaj sciencaj ĵurnaloj. Ni ne havas nun la okazon la titolojn de ĉi tiuj ĵurnaloj skribi. La titoloj de la plej gravaj tag-ĵurnaloj, kiuj skribis, estas tie ĉi: La granda tag-ĵurnalo "Ellenzék"

*) Hungare: Kolozsvár, germane: Klausenburg.

kiu skribis pri Esperanto preskaŭ ĉiutage (ĝi estas eldonata en Kolojvár). Tiuj ĉi ĉefurbaj gazetoj: “*Egyetértés*”, “*Budapesti Napló*”, “*Budapesti Hirlap*”, “*Magyar Hirlap*”, “*Magyarország*”, “*Pesti Hirlap*”, “*Magyar Ujság*”, “*Országos Hirlap*”. (Tiuj ĉi ĵurnaloj estas eldonataj en *Budapest*, ĉirkaŭe en 30—40,000 ekzempleroj ĉiutage). Skribis ankaŭ la ĉefurbaj germanaj gazetoj: “*Budapester Tagblatt*”, “*Neues Pester Journal*”. Multajn artikolojn presis ankaŭ tiuj ĉi ĵurnaloj: “*Kolozsvár*” (en la urbo Kolojzvár), “*Nagyvárad*” (en Nagyvárad), “*Debrecen Hirlap*”, “*Debrecen*” (en Debrecen), “*Alföld*” (en Arad. Ĝi jam ne ekzistas), “*Nyugatmagyarországi Híradó*” (en Pozsony).

Vidinte la redaktoroj, ke s-ro B. mem faras la propagandon kaj mem skribas la verkon, neniu faris mokon el la ideo, sed faris propagandon por la Esperanto ankaŭ tiuj redaktoroj, kiuj estis malamikoj de ia lingvo internacia.

Tiel estis ebla, ke la lingvo prenis en Hungarujo tute ne atenditan disvastigon en mallonga tempo — kaj tiel estis ebla, ke nun en tiu lando ne ekzistas eĉ nun vilaĝo, kie la homoj ne sciis pri Esperanto.

Tiun ĉi propagandon faris s-ro B. mem sole, neniu helpis al li. Ĉiujn artikolojn al la gazetoj skribis li mem, kaj en la daŭro de tiu ĉi tempo — krom sia ĵurnalista agado — li sole pri Esperanto laboris.

Ni scias ekzemple, ke li skribis pli ol 700 privatajn leterojn, donante sciigojn kaj informojn pri Esperanto al personoj, kiuj turnis sin al li kun siaj demandoj.

Li eldonis 5000 broŝurojn tuŝante la demandon de l' lingvo internacia, kaj tiujn ĉi dissendis senpage al la direktoroj de 300 ĉef-lernejoj, al universitatoj, kluboj, sciencaj societoj, oficejoj kaj izolitaj lokoj de la lando.

Post tiuj ĉi laboroj s-ro B. skribis la plenan verkon pri Esperanto. La verko estas sufiĉe granda, kaj tion ĉi enhavas: *Gramatiko*, *Ekzercaro*, *Elektaĵoj el la literaturo Esperanta*, *Vortaro Hungara Esperanta*, *Vortaro Esperanta Hungara*, *Volapük aŭ Esperanto*, *Sciigoj al Esperantistoj*.

Tiu ĉi verko estas la plej bona kaj plena lernilo, ĝis nuna tempo eldonita pri Esperanto. Estas vera plezuro por okulo ĝin rigardi, ĉar ne sole la enhavo estas la plej bona, ankaŭ la eksterajo de la libro estas belega, ĝia preso, papero — ĉio — estas delikataj. Vere, la aŭtoro nenian elspezon rifuzis por doni al la publiko plenbonan verkon. Li gravurigis la literojn akcentitajn de l' alfabeto Esperanta en kvar formoj (garmondo, kursivo, petito kaj specialaj literoj por la vortaro). La eldono de la verko kostis al li 3,000 frankojn.

La libro komencas per antaŭparolo de d-ro Bálint. Precipe la elekto de modeloj el la Esperanta literaturo estas treege sukcese farita. Se ni ion rimarkus kiel mankon de la verko, estus tio, ke la vortaro ne sciigas, kiuj estas la vortoj ne akceptantaj la gramatikajn finiĝojn, ekzemple “ajn”, “tuj”, “ili” k. t. p. Sekve — por preni unu ekzemplon — ni trovas du malegalajn vortojn “ĉiel”, nome: “*ĉiel*, mindenképen” (cetere tiu ĉi vorto estas erare presita “*ciel*”; bedaŭrinde oni trovas ne malmulte da preseraroj, precipe en la vortaro), kaj “*ĉiel*, ég”. Aŭ oni devus distingi per steleto la unuan *ĉiel**, aŭ meti streketon ĉe la fino de la alia *ĉiel'*, kaj konsekvence tiel fari ĉe ĉiuj vortoj. Tio ĉi estas nia plej grava rimarko, kaj ni ne juĝas ĝin sen-signifa. Alia nia observigo koncernas tion, ke kunmetitaj vortoj ne estas partigitaj per streketo laŭ siaj radikoj, kaj sekve tiela vorto kiel “memstara” ŝajnas esti radika vorto. La fundamentan vortaron oni sendube ne povas fari tro klareca. Suborde grava, sed tamen ne korekta ni trovas la diron, ke la

verba formo kun la finiĝo *us* estus *optativo*, anstataŭ la vera, en *u* finiĝanta, ordona kaj *dezira* formo. La titolo "világnyelv" (mondlingvo) estas fariĝinta per volapük iom malbone sonanta vorto, almenaŭ en kelkaj landoj, tial ni plej ofte ĝin evitas, uzante plivole la nomon "internacia lingvo". Pro tia kaŭzo estus pli bona, laŭ nia opinio, la esprimo "nemzetközi nyelv".

Sed la mankoj de l' verko malaperas kiel guto en la maro en komparo kun ĝiaj multaj kaj grandaj bonegecoj.

Laste sed ne malpli grave: la verkinto, s-ro B., organizis du literaturajn konkursojn laŭ la programo sekvanta:

I. Traduko de unu rakonto de *Jókai*, la plej granda vivanta hungara verkisto.

II. Traduko de unu balado de *Arany* aŭ malgranda poemo de *Petőfi*, plej granda hungara poeto.

La premio estas 120 frankoj, kion s-ro B. mem pagos. La kondiĉoj de la konkurso estis anoncigitaj en ĉiuj ĵurnaloj kaj estas legataj ankaŭ en la fino de l' verko.

Nia energia hungara amiko ankaŭ faris kelkajn vojaĝojn pri Esperanto kun plezura sukceso. Mallonge — li faris por la afero ĉion, kion estas ebla fari unu homo.

Ĝis nuna tempo la organo de la propagando estis la granda ĵurnalo "Ellenzék" kaj ĝi estos ankaŭ poste. Sinjoro Barabás petis nin sciigi, ke li volonte malfermas la kolonojn de sia ĵurnalo "Ellenzék" al la afero Esperanta. Sed ne sole sian. Li parolis ankaŭ kun redaktoroj ĉefurbaj kaj ili ankaŭ helpos al la afero, kaj presos artikolojn pri Esperanto en siaj gazetoj.

Ankoraŭ ni staras mirante ĉe unu fakto laŭ la devizo "ne vortoj — sed faroj".

Kaj — Hungarujo estas nia!

P. N—n.

El Belgujo.

Kvankam ni de la pasinta januara monato okupiĝadas je la nova lingvo, estas nur hodiaŭ ke ni efektive konatiĝas kun la esperantistaro. Oni do permesu al ni, enirante en tiun familion da progresamaj homoj, da amantoj de l' homaro, adresi al ĉiu koran saluton kunfratan.

Ni estis dezirintaj skribi pli frue al la ĵurnalo por raporti pri la moviĝado de Esperanto en Belgujo, sed okupadoj premegaj ĝis nun malhelpadis al ni plenumi nian deziron. Ni tamen pensas, ke la amikoj ne plendos je tiu malfruo, kiam ili estos legintaj tute nian leteron, ĉar tiu ĉi alportas novaĵojn bonegajn pri la estonteco de Esperanto en Belgujo, kaj ni ĝin kuraĝas diri, en la tuta mondo.

Kiel oni ĝin legis en la numero februara de "Lingvo Internacia" kurso ĉiamekzistanta estas aranĝita ĉe l' brusela poliglota klubo. Ni komencis la unuan kurson la 27-an de l' pasinta januaro, kaj donis la lastan lecionon la 31-an de marto. Trideko da gelernantoj alestis je tiu kurso ĝis la fino kaj estas nun kapablaj interŝanĝi korespondaĵojn kun fremdaj esperantistoj. Je l' 21-a de la nuna monato malfermiĝos nova kurso, por kiu ni jam ricevis multajn demandojn pri enskribo. Estas do al ni permesita diri, ke Esperanto faradas grandajn progresojn en Bruselo kaj ke la vastiĝado tiel efika,

entreprenita de s-o leŭtenanto Lemaire, donis rezultatojn feliĉajn kaj kuraĝigantajn, ne sole por la belgaj adeptoj sed ankaŭ por tiuj de alilandaro.

Sed, ne estas sole en la ĉefurbo de l' lando ke la lingvo varbadas adeptojn; ĝi ankaŭ disvastigadas en la aliaj urboj kaj nome en Gilli (Charleroi) kaj en Spa. Unu el niaj plej bonaj lernantoj, s-ro Roelandt, ĵus fondis esperantistan rondeton en tiu unua urbo kaj donas tie kursojn ĉiudimanĉe. Ni konas la sindonemon, energion de nia amiko kaj estas certaj, ke danke al li la regiono tiel industria kaj riĉa de Charleroi baldaŭ kalkulos multajn esperantistojn. Ni esperu ke tiel same kiel li multaj el liaj lernantoj fariĝos vastigantoj kaj instruistoj, kaj tiamaniere potence helpos por konigadi la novan lingvon kaj por plioftigi, plifaciligi kaj pliagrablighi la interkomunikojn ekzistantajn inter la popoloj de l' tero.

Nia legantaro vidas per tiuj sciigaĵoj, ke Belgujo, kiu dum longa tempo malrapidigadis por aliĝi decide al nia afero, nun volas sin meti je la unua rango de la landoj, kiuj plej multe laboradas por la prospero de l' nova sistemo. La vojo trairita, de l' tago kiam leŭtenanto Lemaire donis sian unuan paroladon, estas longega, kaj oni vidos pli malsupre, en kiaj favoraj kondiĉoj sin prezentas la estonta vastigado, kiu, ni ĝin esperas el tuta koro, havos tutmondan influadon.

Oni ne pensu ke ni ĉion diris pri la progresoj de Esperanto en Belgujo. Jen estas tio, kion ni skribis por la eldono de "Le Petit Bleu", kiu eliros la 17-an de l' nuna monato.

"El Spa, la gajega urbeto ardena, ni ankaŭ ricevas informojn pri kiuj ĝojos ĉiuj partianoj de l' nova lingvo. Je la 27-a de l' pasinta monato, s-ro Ch. Hault donis ĉe l' rondeto arta kaj literatura de l' nomita urbo, antaŭ grandega aŭdantaro, unuan lecionon de kurso publika pri la lingvo internacia. Pri tio presas gazeto de tiu urbo, "La Tribuno de Spa", artikolon longan, el kiu ni eltiras liniojn sekvantajn:

La simpleco de tiu ĉi (Esperanto) estas tiel granda, ke je l' merkreda kunsido, post la parolado de s-ro Hault, la plejmulto da alestantoj faris laŭte kaj senprezare la tradukon de letero, kiun la parolanto estis skribanta sur la tabulon nigran... Ekster ĝia grandega simpleco, tiu lingvo estas riĉa kaj ĉarmadas la orelon; ĝi certe posedas necesajn ecojn por ricevi grandan sukceson."

* * *

Tio, kion ni komunikis pli supre, elvokos certege vivan ĝojon ĉe niaj amikoj; ĝi kuraĝigos ilin al la propagando por Esperanto kaj decidus multe da ŝanceliĝantoj por aliĝi al ni. Ankoraŭ multe pli interesanta estas tio, kio al ni restas por sciigi al nia legantaro. Ĉiu scias ke la ĵurnaloj, precipe la gravaj ĵurnaloj, ne montras multe da rapideco por nin helpi, por publikigi la artikolojn, pri kies lokigo ni ilin petas, se aŭ por anonci la malfermiĝon de publikaj kursoj, aŭ ankoraŭ por sciigi la fondadon de vastiganta klubo. Nu, unu gazeto brusela, unu el la plej gravaj kaj legataj en Belgujo, ne sole donas al ni la malavaran helpadon de ĝiaj kolonoj, sed eĉ nin subtenas kaj baldaŭ helpados grandamezure al la universala vastigado de Esperanto.

Kelkaj fremdaj esperantistoj skribintaj al "Le Petit Bleu" por anonci ke ili abonus nomitan ĵurnalon, se ĝi daŭrigus elirigi ĉiadimanĉe kronikojn esperantistajn, kaj kelkaj aliaj anoncintaj, ke ili estas pretaj sendi senpagajn artikolojn, verkitajn en la nova lingvo, ni proponis al la direktoro de l' gazeto efektivigi *dimanĉajn abonojn solege por esperantistoj*. Ni rimarkigis al li, ke

la semajnaj eldonadoj malmulte interesus la alilandulojn — la plejmulto el ili nesciante francan lingvon — sole eldono dimanĉa enhavante tekston esperantan. Dividante nian opinionon li malavare akceptis nian proponon. Jen estas la kondiĉoj, je kiuj niaj amikoj povas aboni la diritan gazeton.

Jarabono . . . kostas: 7 frankojn kaj 50 centimojn;
duonjarabono . . . „ 4 frankojn;
kvaronjarabono „ 2 frankojn kaj 25 centimojn.

La Direktoro de l' gazeto volonte akceptos kaj eĉ *deziras ricevi* el diversaj landoj kronikojn esperantistajn. Por kuraĝigi niajn alilandajn amikojn, por pruvi ke Esperanto povas servi por transdoni ĉiujn niajn ideojn kaj ankaŭ por fari ke la teksto esperantista estu tiel originala kaj interesanta kiel eble, la dirita ĵurnalestro decidis doni *kiel premio* plenan jaran abonon al la personoj — *unu* persono el *ĉia* lando — kiuj, dum la unua jaro de ilia abono dimanĉa, estos sendintaj al la ĵurnalo, en lingvo Esperanto, la plej originalan kaj interesan legendon el ilia lando.

La artikoloj — skribitaj pri iaj ajn temoj —, kiujn niaj amikoj certege ne mankos sendi al ni, estos publikigataj en la dimanĉa aldonaĵo de “Le Petit Bleu“, samtempe kun la franca tradukaĵo. Estas apenaŭ necese insisti sur la graveco de l' helpado, kiun tiu gazeto donadas al ni tiel malavare. Legate en ĉiuj urboj kaj en la plejmulto da vilaĝoj belgaj, kaj ankaŭ en kelkaj alilandaj urboj kaj precipe en Francujo, la dirita ĵurnalo disportos ĉie la bonan semon; ĝiaj artikoloj esperantistaj-francaj, venantaj el la landoj la plej malsamaj kaj malproksimaj, interesados vivege la legantaron, al kiu ili donos nekontraŭdireblan pruvon ke nia lingvo jam estas multe vastigita kaj ke ĝi permesas al homoj de naciecoj kaj lingvoj tiel malsamaj sin klare esprimi per organo komuna.

Kiel ni diris pli supre, la dirita gazeto helpados potence al la vastigado tutmonda de Esperanto. Ne estas dubo, ke tia granda ĵurnalo ĉiutaga, eliradante en lando neŭtra kaj kosmopolita kiel Belgujo, estos por ĉiu el ni ilo inda por varbi adeptojn. Kiam ni metos sub la okulojn de la personoj, kiujn ni volas altiri al nia afero, ekzemplerojn de tiu gazeto, tiuj personoj devos konfesi, ke nia lingvo jam estas tre vastigita, ke ĝi devas havi iom da merito, kaj ili malpli ŝanceliĝados aliĝi al ni. Sed la publikigado de artikoloj en ĵurnalo egale estos profitiga al esperantistoj mem, eĉ al tiuj, kiuj estas plej multe sindonitaj al la afero. Ĉiu scias ke nia aparta organo “Lingvo internacia“ malfacile povas eliri je dato difinita, estante preparata de personoj kiuj ne estas pagataj por plenumi tiun laboron, kiuj, kontraŭe, oferados ofte ilian monon kaj ĉiam ilian tempon. Kiel oni bonege scias, la samo ne povas ekzisti tuŝante la ordinarajn gazetojn. La abonantoj je “Le Petit Bleu“ regule ricevos tiun ĵurnalon, je dato malsanĝe sama; oni ankaŭ komprenos ke estos tre profitiga por ĉiu ricevi ĉiusemajne esperantistan tekston: komencantoj trovos en ĝi materialon por sin ekzerci; ili atendados kun sciameco kaj eble kun senpacieneco ĉian numeron; la demando preskaŭ senĉese okupados ilian spiriton; ili ne havos tempon por forgesi kion ili ĵus lernas. La aliaj, tiuj kiuj skribas kaj komprenas fluante la novan lingvon, ankaŭ ricevos plezure artikolojn esperantistajn; la ĵurnalo ne lasos dormeti eĉ ili ideojn esperantistajn; ili pli ofte estos alkondukitaj paroli pri la lingvo al iliaj amikoj, ilia agado estos pli ofta kaj efikema.


“Le Petit Bleu“ ankaŭ posedas vastan kaj luksan librovendejon tute je la centro de l' urbo. Ni proponis al la direktoro, ke oni konservu koresponda-

jojn venontajn el alilandaro por aranĝi kiel eble plej frue ekspozicion en dirita librovendejo. Nian proponon oni akceptis kun entuziasmo kaj tuj kiam la ĵurnalo estos ricevinta leterojn, poŝtajn kartojn, k. t. p. en nombro sufiĉa, ekspozicio malfermiĝos. Jen estas ankoraŭ bonega rimedo por konigi nian lingvon al la publiko. Ni pensas ke estus eble rapidigi aranĝadon de tiu ekspozicio kaj jen kiel: nia legantaro sendube juĝos, ke "Le Petit Bleu" liveras al ni grandan helpadon kaj ke ni devas sen malfruo montri nian dankadon. Nu, la societoj esperantistaj kaj personoj kiuj ĝin povas fari, abonu la dimanĉan eldonaĵon kaj ĉiu alsendu al la ĵurnalo "Le Petit Bleu" poŝtan karton aŭ leteron per kiu li ĝin dankados por la aminda kunhelpado kiun li donas al nia afero. Poŝtkarton aŭ leteron ĉiu povas sendi, kaj ni petas ĉiun fari tiun malgrandegan elspezon por la bono de nia karega afero. La artikoloj, kiujn niaj legantoj preparos kaj kiuj ordinare ne devos enhavi pli ol 500 ĝis 600 vortojn — ili ankaŭ povus enhavi nur 200 vortojn — devos esti sendataj rekte al dirita ĵurnalo.

Bruselo, 14-an de aprilo 1898.

Ed. Blanjean.

14, rue de Wautier-Laeken.



Novajoj.

Publika kunveno de "Espero".

Marto 6-an n. s. en Soljanoj Gorodok (ejo de diversaj kunvenoj, raportoj, publikaj antaŭlegadoj ktp) efektiviĝis komuna kunveno de la membroj de la peterburga societo "Espero".

Kvankam, danke al malprospere elektita tago kaj kelkaj aliaj malfavoraj kondiĉoj, la kunveno estis iom malpli multenombra, ol oni povus esperi, tamen ĝi ne pasis senutile kaj kredeble donos bonajn rezultatojn, konatiginte peterburgan publikon kun celoj kaj agado de nia societo.

La kunveno estis malfermita per nelonga parolo (en esperanto) de la prezidanto s-ro Postnikov. Prezidanto de la kunveno estis elektita, laŭ la propono de s-ro Postnikov, s-ro Kanaloŝŝi-Lefler, eksprezidanto de nia societo.

Antaŭ ĉio la sekretario s-ro Ostanieviĉ tralegis raporton pri agado de la societo daŭre la lastaj du jaroj kaj pri ĝia nuna stato. Memoriginte al la aŭskultantoj tian bedaŭrindan situacion, en kiu sin trovis la aferoj de Espero antaŭ du jaroj, kiam ĝia nuna komitato nur komencis sian agadon, s-ro Ostanieviĉ montris, en kia grado progresis la societo en lastaj du jaroj, atentigis la publikon je plej gravaj ĝiaj faroj, komparis tute firman nunan staton ĝian kun la antaŭa, kaj plej atente priparolis sukcesojn de Espero en la lastaj monatoj.

Poste s-ro N. Sutkovo raportis pri "Kultura signifo de lingvo internacia". Internacia komunikiĝo — diris s-ro raportanto — havas sendube grandegan kulturan signifon kaj tial rapidege progresas. Nenio povas kontraŭstari ĝian progreson, ĝi forigos de sia vojo ĉiujn barojn. Plimulto da baroj estas jam preskaŭ tute forigita (ekz. spaco), kaj nun ni devas atendi forigon de la lasta serioza baro — diverslingveco, kiu povas esti senmalutiligita nur per arta lingvo internacia. La lasta estas ne senfundamenta utopio, sed neevitebla sekvo el faktoj kaj tendencoj de l' nuna vivo. Ke solvo de la problemo estas jam proksima pravas ankaŭ ĉiam kreskanta intereso al lingvo internacia. Kiam do ia lingvo (tre riĉa kaj facila) sufiĉe disvastiĝos, ĝi fari-

ĝos gravega progresilo, ĝi naskigos riĉegan internacian literaturon, senbezongos lernadon de fremdaj lingvoj, unuigos diverslandajn scienculojn ktp: unuvorte ĝi multe plifaciligos kaj pligrandigos internacian komunikiĝon, per kio ĝi alportos ne malgrandan utilon al tuta estonta homaro.

S-ro Kanaloŝŝi-Lefler faris kelkajn rimarkojn rilate la raporto kaj interalie diris, ke en la lastaj 15 jaroj aperis ĉirkaŭe 40 novaj sistemoj de lingvo internacia.

La lasta raportis s-ro Postnikov pri: "Nuna stato kaj disvastiĝo de la lingvo internacia esperanto." El tiu ĉi raporto la alestanta publiko konatiĝis kun nuna stato de tuta nia afero: kun nia literaturo kaj gazetoj, kun opinioj pri esperanto de diversaj pensuloj, kun internaciaj vojaĝoj, kun provoj uzi esperanton en sfero de ĵurnalismo ktp. Montrinte nunan staton kaj progreson de l' esperantismo, s-ro raportanto transiris al ĝiaj ĉefaj kondukantoj en diversaj landoj kaj montris per fantom-lanterno portretojn de s-roj: Zamenhof, Trompeter, de Beaufront, Gernet, P. Nylén, V. Langlet, Wasniewski kaj s-rino A. Proĥoroviĉ-Koĉmarenko kun ŝia sveda amikino Maja Fornander.

En la fino la kunveno preparolis kelkajn aferojn kaj elektis kelkajn novajn membrojn.

La Klubo Esperantista en Stockholm.

Nombro da personoj sin interesantaj por la lingvo Esperanto kunvenis la 4-an de aprilo en Stokholmo kaj konstituis klubon, akceptante regularon esence konforman kun la projekto de l' komitato, kiun elektis antaŭa prepara kunveno.

Prezidanto estis elektita civil-inĝeniero Filip Langlet, sekretario s-ro P. Ahlberg, kasisto s-ro K. Ekström, kaj ceteraj membroj de la estraro s-rino Maja Fornander kaj s-ro V. Nyberg. La regularo notas, kiel la celon de la klubo, la disvastigadon de la lingvo internacia Esperanto, kaj ĉiu lerninta aŭ lernonta tiun ĉi lingvon povas membriĝi en la klubon.

Antaŭ la finiĝo de l' kunveno s-ro V. Langlet alportis saluton de la Klubo Uppsala, memorigante pri la malfacilaĵoj, kiujn devis traŭri tiu ĉi klubo en sia komenco, kiel iom post iom ĝi transbatalis ilin, kaj prosperis enmeti indan faron por la disvastigado de Esperanto.

* * *

En *Grenoble* (Francujo) d-ro Emile Roux sukcese agadas por la vastigo de nia lingvo. La 28-an de januaro d-ro R. parolis al granda aŭdantaro en la Asocio de Komerco kaj Industrio, kaj lia parolo estas tre laŭdante raportita en broŝuro eldonita de tiu ĉi societo, ĉe kiu kurso de Esperanto estas aranĝita de d-ro R.

* * *

El *Uleåborg* (Finlandujo) s-ro Laurén sciigis nin, ke tie fondiĝis malgranda rondeto esperantista, kiu akiris jam kelke da anoj; oni atendas nur la novan eldonon de la svedlingva lernolibro por komenci serioze la propagandon.

* * *

Al nia lingvo aliĝis *princo B. A. Teniŝev*, direktoro de l' Aleksandra lernejo en Kremenĉug kaj frato de la rusa ĉefkonsulo en la Pariza Ekspozicio 1900. Princo B. A. Teniŝev estas tre klera homo; liaj lernolibroj je matematiko estas rigardataj kiel la plej bonaj en tuta Rusujo.

* * *

Ĉe kunveno de la societo "Studentoj kaj laboristoj" en Stokholmo la 17-an de Aprilo en la granda salono de la Agrikultura Akademio, medicina kandidato s-ro S. E. Krikortz faris publikan parolon pri "Esperanto, neŭtrala lingvo". La parolinto ricevis aplaŭdon.

* * *

La nova portugala lernolibro, verkita de d-ro Manuel Ribeiro da Costa e Almeida, laŭ la modelo de la lernilo franca de s-ro L. de Beaufront, estas nun publikigita. La libro enhavas, krom gramatiko kun antaŭparolo, vortaron esperanta-portugalan kaj portugala-esperantan. Ambaŭ estas sufiĉe plenaj, kaj la aŭtoro enmetis en ordo laŭlitera ankaŭ multajn kunmetitajn vortojn, ne sole la radikojn kaj sub ili unu aŭ alia kunmetitaĵo.

En la vortaro port.-espa estas uzata la plena esperanta formo de vortoj, nome kun la finvokaloj. Tio ĉi pligrandigas videble la indon kaj utileblecon de la vortaro precipe por alilingvanoj, kiuj povas pro tio kun pli da facileco uzadi ĝin studiante la portugalan lingvon.

La verko sendube helpas grandmezure al progreso de nia lingvo en Portugalujo.

* * *

Pri Esperanto parolis: En la n-ro 154 de la *Granda Enciklopedio pola*, eldonata en Varsovio, oni trovas bonan artikolon sub vorto: "Esperanto." Tiu ĉi artikolo rakontas mallongan historion de diversaj provoj de lingvoj internaciaj, montras ridindecon de volapük (en kiu Ameriko sin nomas "Melop", Francujo "Flent") kaj enhavas tutan gramatikon de l' Esperanto kaj kelkajn novaĵojn pri nia lingvo. La artikolo estas presita en tiu ĉi jaro.


En *Svedujo* multaj gazetoj parolis pri nia lingvo kaŭze de la fondiĝo de l' Stokholma klubo, inter aliaj: *Dagens Nyheter* n-ro 10115 A. la 5 de Apr. kaj 10131 la 26 de Apr., *Stockholms Dagblad* n-ro 156 la 5 de Apr., 174 la 18 de Apr. kaj 188 A. la 26 de Apr., *Svenska Dagbladet* n-ro 92 la 5 de Apr., *Stockholms-Tidningen* n-ro 2542 A. la 18 de Apr. kaj n-ro 2549 A. la 26 de Aprilo; ankaŭ *Aftonbladet* kaj *Nya Dagligt Allehanda* havis noticojn, sed bedaŭrinde ni ne scias, en kiuj n-roj. Ĉiuj noticoj de tiuj ĉi gazetoj estis seriozaj kaj sciigoj pri faktoj. — En n-ro 35 de *Norrbottnens Kuriren* ni legis la sekvantan artikoleon sub la rubriko: "Kiel oni disvastigas Esperanton": "La ensendinta tiujn ĉi linietojn estus tre dankema, se iu povus sciigi, kiu estas la jukafingra kaŭzulo (!), kiu malnetadas la banknotojn de la privata banko de Norrbotten per la vorto "Esperanto". Tia hejduko devus esti punigata. Akciposedanto en la privata banko de Norrbotten." — N-ro 21 de *Norrbottnens Allehanda* (Piteå, Svedujo) enhavas la duan artikolon pri nia lingvo, verkitan por la dirita gazeto de s-ro H. J. Bäckström.

En *Hungarujo* ĉirkaŭe 300 gazetoj parolis pri nia lingvo dum la lastaj monatoj (vidu pri tio ĉi la artikolon pĝ 49). — Unu tre simpatia artikolo de *Budapester Tagblatt* finiĝas per la vortoj sekvantaj: "Laŭ nia opinio, staras ekter ĉia dubo tio, ke post la daŭro de kelkaj jaroj tiu ĉi afero atingos gravecon apenaŭ antaŭsentatan ankoraŭ nun, kiel ankaŭ jam nun oni trovas en la grandaj urbegoj la okazojn ke oni postulas ĉe donotaj lokoj de okupado, ke la dezirantoj ankaŭ konu la internacian lingvon Esperanto."

En *Belgujo* la granda Brusela taggazeto "*Le Petit Bleu*" en sia dimanĉa aldonaĵo de la 4 de Aprilo enhavas "Kroniketon Esperantan", per kiu s-ro L. de Beaufront pravas la senindecon de la ofte ripetata rediro, ke la samajn lingvajn sonojn ne kapablas produkti ĉiuj gorgoj de ĉiuj malsimilaj lingvanoj kaj naciecoj.

En *Francujo* publikigata stenografia gazeto "*La Lumière Sténographique*" — en la sistemo de Duployé — pridiras per kelke da vortoj en sia Aprila numero la disvastigadon de Esperanto precipe inter la adeptoj de l' stenografio, kaj direktas la atenton de siaj legantoj al nia kolego-gazeto franca, "L' Espérantiste".

La finlanda gazeto *Uleborgsbladet* redonas en sia n-ro 24 sub la rubriko "Diraĵo pri Finlandujo" parton, svede tradukitan, el la letero de s-ro A. Z. (rig. "L. I." n-ro 26, pĝ 20).



Esperantistoj—korespondantoj!

La redakcio de l' gazeto "Söderhamns Tidning" en Söderhamn (Svedujo) petas ĉiujn esperantistojn. kiuj volas helpi al la afero Esperantista. ke ili bonvole alsendu al ĝi korespondaĵojn pri diversaj cirkonstancoj kaj okazoj en iliaj lokoj de loĝado. La korespondaĵoj estos tradukitaj kaj presitaj sub la komuna titolo "Korespondaĵoj ricevitaj per la lingvo Esperanto". La adreso de la gazeto estas nur: "Söderhamns Tidning". *Söderhamn*, Svedujo.



Japana Bonveno-Societo

Kihinkwai.

En fino de la jaro 1893 en Japanujo aperis nova societo tre grava kaj oportuna por ĉiu vizitanto de tiu interesa rapidege sin civilizanta lando de malproksima oriento.

Ni parolas pri la "Bonveno-Societo", kiu jam akiris afablan favoron de multaj japanaj eminentuloj kaj enhavas en siaj vicoj ankaŭ multegon da alilanduloj.

La plej gravaj celoj de la Bonveno-Societo estas tre similaj al la societoj "Espero" en S. Peterburgo, *Turista Societo* en Svedujo, la *Société d' Etudes internationales* en Parizo kies organo estas *l'Étranger*, kaj la Klubo Esperantista en Uppsala kun la gazeto "Lingvo Internacia".

La societo penas efektiviĝi:

1. Faciligigi al la alilanduloj vizitantaj Japanujon la observon de produktoj de l' arto kaj la vizitadon de ĉiuj lokoj interesaj por ili.
2. Faciligigi al ili la aĉetadon de la produktoj de japana industrio.
3. Faciligigi la vojaĝadon.
4. Konigi la vojaĝantojn kun eminentaj homoj de Japanujo, k. c.

La Bonveno-Societo en Tokio, kies agado estas absolute senprofitema, estas en konformaj rilatoj kun la "Societo de Gvidantoj" (*Guides' Association*) en Jokohamo kaj Kobe.


Se ni notos, ke kun helpo de tiu-ĉi societo la vizitantoj de Japanujo ricevas eblon penetri en multajn tre gravajn lokojn, ekzemple: Imperiestra Botanika kaj Arsenala ĝardenoj, Supra kaj Malsupra Ĉambro de la deputatoj, Kaseanta kaj Apela juĝejoj, malliberejoj, hospitaloj, regnaj lernejoj, eminentaj faktorioj, fabrikoj, moneta fabriko kaj kastelo en Osako k. c., k. c., oni vidos ke la citita societo estas utila ne sole por s-roj japanoj, sed por ĉiuj eŭropanoj, kies intereso estas en Japanujo, kaj tial la Bonveno-Societo en Tokio meritas esti opiniata kiel societo internacie utila.

Ni esperu, ke la suprenomitaj societoj kaj la Redakcio de la gazeto "Lingvo Internacia" trovos eblon sendi siajn mendojn kaj ekzemplerojn de siaj organoj al ĝi, por havi eblon ricevadi respondan kaj pluan sciigon pri la agado de tiu ĉi utila societo, kiu devas esti nepre interesa por la legantoj de nia organo.

La adreso de l' administrejo de la Bonveno-Societo estas:

Welcome Society (Kihinkwai). Imperial Hôtel. Tokio. Japanujo.

V. Sh.



El Heine.

I.

Se preter via domo
Mi iras, bel-knabin'.
Mi ĝojas, se mi vidas
Ĉe la fenestro vin.

Vi mute min rigardas
Per nigra par-okul':
"Vi kiu estas, kio
Vin mankas, suferul'?"

— Mi estas germanlanda
Poeto, bel-knabin';
Plej bonajn nomojn nomu,
Vi nomos ankaŭ min.

Kaj miaj mankoj estas
Oftaj' en Germanuj';
Plej grandsuferojn nomu,
Vi nomos miajn tuj. --

II.

La maron lumis ar-radi'
De l' suno okcidenta;
Ĉe la fiŝista domo ni
Sidadis en silento.

La mevo flugis ĉe la mar',
Kaj levis sin nebuloj,
Kaj fluis larmoj, larma ar'
El viaj bel-okuloj.

Ha, ili fluis per seri'
Sur viajn manojn ĉarmajn,
Mi genufleksis antaŭ vi
Kaj trinkis tiujn larmojn.


De tiu hor' trapikas min
Turmentoj-mortigiloj;
Ha, min venenis la virin'
Per siaj larmoj brilaj!

III.

En nordo staras sole
Sur nuda monto pin'.
Ĝi ŝonĝas; blanka neĝo,
Glacio kovras ĝin.

Ĝi ŝonĝas palmon, kiu
En fora orient'
Silentas kaj malĝojas
Sub brula suda vent'.

A. Kofman.



Pri traduko de la Sankta Skribo.

La bona artikolo de s-ro M. S. Rakitski en n:o 1 de 1898, paĝ. 13, igas min skribi la sekvantajn liniojn.

Ankaŭ mi dum kelka tempo iom min okupis je tradukado de la sanktaj evangelioj en nia kara Esperanto. Kaj mi povas atesti, ke tiu ĉi laboro enhavas en si tre grandajn malfacilaĵojn, parte ne egalajn je tiuj malfacilaĵoj, kiujn ni renkontas ĉe aliaj laboroj. Multaj diversaj kaŭzoj interrompis nun por mi tiun ĉi tradukadon; interalie mi estas konvinkita, ke personoj el almenaŭ tri nacioj devas kunlabori en tiu ĉi afero. — La propono de s-ro M. S. Rakitski al mi ŝajnas tre bona kaj akceptebla. — Kaj la presado kaj ĝiaj kostoj? *Eble* oni volus presi la unuajn partojn (de la Nova Testamento) en la "Biblioteko", *eble* la "Britana kaj Eksterlanda Societo de Biblioamikoj" (Societas Bibliophilorum Britannica et Externa) en London volus ricevi bonan manuskripton kaj preni sur si ĝian presadon kaj eldonon. (Rim.! mi nur

diras: *eble!*) — Mi timas, ke la Klubo Esperantista en Uppsala ne povas promesi dum 1898 aŭ 1899 eldoni la intencatan Bibliotradukon aŭ parton da ĝi. Aŭ kion dirus la Klubo?

Kaj nun ni devas *baldaŭ* komenci. La “aparta rondeto por tradukado de libroj de la Sankta Skribo” devas esti kunmetata kaj inter siaj anoj dividi la laboron. — Mi kuraĝas humile turni ankoraŭ unu fojon la atenton de la amikoj-esperantistoj je tio ĉi, kio sendube estas grava.

Volu s-ro Rakitski ricevi mian humilan dankon kaj saluton pro lia artikolo!

Knutby (Svedujo) 23. Marto 1898.

K. O. Svanbom.

La Provizoro.

Germane verkis

Rudolf von Rosen.

La juna, serioza viro, miksanta en la apoteko el la venenoj diversajn kuracilojn nevidis ofte la ekrigardon el belaj okuloj, ripozantan sur siaj trajtoj de l' vizaĝo. Kial? Li estis ja edzigitaj kaj vivis kun sia edzino en plena harmonio anima. Jam du jaroj li estis la edzo de Aŭrelia kaj sentiĝis kontenta, reveninte sian modestan hejmon post la penoplena taga okupado.

Sed Teodoro ne elektis mem Aŭrelion al si.

Lia eternen irinta patrino, kiu al la dankema filo estis ĉio sur la tero, deziris sur la mortolito, ke Teodoro konduku al la altaro la orfinon Aŭrelion, kaj la filo plenumis tiun ĉi deziron.

Kvankam lian bonan patrinon Aŭrelia ne povis al li anstataŭi, kondukis tamen la juna sinjorino la dommastraĵon al lia kontenteco. Ĉagrenecoj kaj disputoj ne ekzistis inter ili; al la geedzoj mankis nenio. La kuracilisto posedis malgrandan renton el la heredo de sia patro, kaj lia salajro estis agrabla plienspezo. —

Venintan hejmen, salutis Aŭrelia Teodoron per amplena regateco. Kivante sian edzinon sur la frunto, la kuracilisto kviete glatigis ŝiajn blondajn harojn; per tio finis lia afableco kaj li turnis la atenton al la vespermanĝo.

Aŭrelia ridetadis ĝoje, se Teodoro iam ekforgesis sian seriozecon. Tiaj momentoj estis maloftaj, sed malgraŭ tio pasadis ilia vivo trankvile kaj en paco. Unu tage Aŭrelia rakontis eĉ malgrandan aventuron! Ŝi venis sur la ŝtuparo de l' unua etaĝo ĝustatempe por eksavi de falego treege belan kaj elegantan virinon. La fremda sinjorino deglitis, kaj Aŭrelia ekkaptis ŝin. Al sia plej granda miro, sciiĝis Aŭrelia, ke la interesinda persono kun la nigrega haro kaj la grandaj mallumaj okuloj estas teatra ludistino kaj loĝas en la unua etaĝo de tiu sama domo.

Teodoro elaudis la historieton vespermanĝante kaj restis tute indiferenta pri tio, ke la artistino Norina elturniĝis sian piedeton.

Tagoj pasis. Teodoro estis surprizata, kiam lia edzino eĉ en la apoteko lin vizitis, ĉar tio ĝis nun ankoraŭ neniam okazis; Aŭrelia devigis lin iri kun ŝi en la teatro; fraŭlino Norina ludos kaj donis jam al Aŭrelia la biletojn; la artistino estas ĉarmanta, tre estiminda fraŭlino; ŝi tiel amikiĝis kun Aŭrelia, ke ŝi — Norina — tutajn horojn pasigis vizite en la tria etaĝo. Teo-

doro sulkis iom la frunton, sed malgraŭ tio aranĝis por si la eblon, viziti en tiu ĉi vespero kun sia edzino la teatron.

Aŭrelio estis ravita pri la eksteraj kaj ludado de Norino. Sed ankaŭ la kuracilisto ne formetis la teatron okulvitron de sia vizaĝo kaj respondis distre la demandojn kaj la paroladon de Aŭrelio. Dum la revojo hejmen — post la teatra ludo — li montris sin vortavara kaj disharmoniita.

Egaltempe, kiam Aŭrelio kun ŝia edzo venis al la dompordo, haltis dense apud ili fiakro kaj elsaltis Norino, sekvita de ŝia servantino. La artistino devigis la geedzojn viziti ŝiajn luksajn salonojn kaj alpreni malgrandan vespermanĝon. Aŭrelio, ravegita pri la amindeco de Norino, miremis per riĉaj vortoj la artistinon — Teodoro sidis tie kun pala vizaĝo kaj malhele bruletantaj okuloj.

Preninte adiaŭ, paŝis Teodoro kun sia edzino la ŝtuparon supren; la tremanta lumajo de la kandelo falis okaze sur lia konvulsietema vizaĝo; ĝin rimarkinte, demandis Aŭrelio zorgoplene, kio tiel subite okazis al li. “Mi estas malsana”, li diris en raŭka tono, “Vi ne devus devigi min iri teatron!”

Komencante de tiu vespero estis Teodoro efektive malsana. La amo al Norino brulis en lia brusto. Nur de nun li sentis la ligilojn de sia prudent-edzeco. Ju pli ofte li vidis Norinon, — des pli malamamis li Aŭrelion.

La ludistino fariĝis kun Aŭrelio treege amikema, dume ŝia renkontado kun la kuracilisto restadis pli en la kadro de l' malvarma ĝentileco — sed la enamanto pensis tial, ke li ne estas indiferenta ĉe Norino kaj ke Aŭrelio estas la malakcelilo inter li kaj lia feliĉo.

Li fariĝis ankoraŭ pli kaŝema kaj lia konduto kontraŭ la edzino maldelikateta. Aŭrelio iradis ĉirkaŭen kun ruĝiĝaj pro plorado palpebroj, sed interkomunikiĝadis konstante — sen antaŭsento — kun la artistino.

Norino fariĝis ankaŭ depremita kaj senvorta en lastaj semajnoj. “Ŝi batalas kun si mem”, diris al si Teodoro. “Ŝi ne volas fariĝi perfidantino de la — alia!... Ho, ŝi estas majesta lumaperajo!...”

Kaj lia revado por Norino degeneris en profunda melanĥolio. Nenia vorteto estis ŝanĝita inter ŝi kaj li — sed Teodoro rigardis sin kiel amata de ŝi kaj kiel ŝia sklavo. Aŭrelion li preskaŭ tute nezorgis, kaj tiel okazis, ke li subite unufoje ektimis pri ŝia paleco. “Ĉu Vi suferas?”... Li rigardis ŝin longe kaj malordinare rigide, kvazaŭ li bezonus tempon, por jeporti la teruran penson, ĉirkaŭirantan en lia kapo kiel demonna malkrietado. “Oni devas esti atentema”, li poste parolis malsonore. “Mi volas prepari al Vi kuracilon!”

Aŭrelio metis sian febre varmegan manon sur lian brakon; kviete sonis el ŝia brusto: “En la vivo ekzistas situacioj lasantaj sole malferman *unu* eliron. Mi suferas, ĉar mi vidas suferi. Sed mi povas helpi, se — Vi helpetos kaj plenumos mian deziron. — Mi bezonas — venenon...”

La kuracilisto elpuŝis ian gorgĝan sonon kaj elkuregis eksteren. Li kuris tra tutaj horoj en la stratoj, ĉien, nur ne en la kuracilejon, kie li devis esti. Ne — ne — la venenoj starantaj tie en fortike fermitaj ujoj kaj lumon timantaj boteletoj al lia libera disponado, plenumis lin per indignego.

Kiam la nokto jam proksimiĝis, li eniretis kiel ia ŝtelisto sian laboratorion, kie li malposte kun trankvila temperamento pasigis kaj kreis. Lia haro ĉirkaŭis traĵetita la sulkoplenan frunton, kiel frenezeco lumis el liaj okuloj. Antaŭen fleksita, li faleme iris hejmen. Aŭrelio akceptis lin silente; ŝi

diris ankaŭ nenion, kiam li denove forkuris. Ŝajnis, ke ŝi eĉ nerimarkis, kiam li ĵetis sur la tabla kovrilo ian malluman objekton, kvazaŭ boteleton.

La kuracilisto, kiu tiel forte pekis kontraŭ la devoj de sia profesio — kiu krimulo fariĝis, — kuregis denove sen celo ĉirkaŭen. Li vidis Aŭrelion kiel jam mortan, kun blueta vizaĝo, vaste malfermitaj okuloj kaj en la konvulsie fermitaj fingroj la boteleton. Li preparadiĝis al ia mensoga defendado. La edzino ŝteletis de li venenon, li ne havas scion, kiel ĝi okazis. Se Aŭrelio jam volis fari lin liberan, vidinte lin suferi, ŝi certe ankaŭ postlasos leteron, pruvantan klare kaj decide, ke ŝi mem sin venene mortigis.

Lia koro batis pli eksciteme, — li povus ja rapidi al Norino por elpetegi de ŝi la konfeson de ŝia kontraŭa amo!

Noktmezo batis supre en la turo. La kuracilisto alcelis trenante antaŭ sia loĝdomo.

Supre, tra la fenestroj de l' Norina loĝejo briletis lumo. La pordo estis malfermita kaj la edzino de la pordgardisto staris tie kun kandelingo. "Mia edzo forkuris, por voki la kuraciston", diris la virino. "Sed ĝi apenaŭ ion utilos, devas esti ke ŝi prenis tro akran venenon!..." La kuraciliston ekskuis malvarma febro. "Pri kiu Vi parolas?" li balbutis, pensante: "Ja, ŝi havis do la kuraĝon!"...

Li preskaŭ flugis sur la ŝtuparo supren. En la unua etaĝo li vidis helan lumajon kaj kelkajn homojn kun palaj, teruron montrantaj vizaĝoj. El la ĉambroj de la artistino ekpaŝis nun — Aŭrelio, lia edzino. Teodoro ekfalemis, rigardegante ŝin. "Mi iras al la policejo", diris Aŭrelio. "Kaj konfesas, ke mi provizis al ŝi la venenon. Ŝi amis tro malfeliĉe kaj devis finigi tiun ĉi turmentantan ekzistadon." Ĉirkaŭ Teodoro trombis ĉio en rondo. "Pri — Norino Vi parolas?" li grincis. "Norino estas — morta!" — "Jes, ŝi amis senespere." La kuracilisto apogiĝis kadukeme sur la muro.

"Kaj kiun — *kiun* ŝi amis?"


"La grafon"...

"Ne estas vero!" ekkriis la kuracilisto. "Min — min ŝi amis!!" Kaj Aŭrelio rigardis kun senlima doloro, kiel li flugegis en la ĉambrojn kaj falis sur la mortan korpon de Norino.

Per devigeĝo oni devis malproksimigi lin de l' mortinta kaj konduki la kompatindan en la — frenezulejon.

Nun li vivas en anima noktiĝo, miksas el sablo kaj frakaseta murajo venenojn, — kaj kiam lin vizitas la malfeliĉa Aŭrelio, tiam ĉirkaŭprenante ŝin, li nomas ŝin — Norino. —

Kun permeso de l' aŭtoro trad. **J. Socha.**



De niaj abonantoj.

En la n-ro 12 de "L. I." de la pasinta jaro mi legis la leteron de A. Grünfeld pri la represado de la malnovaj jarkolektoj.

Mi aprobas tiun ĉi projekton, kaj estus tre dezirinde ke ĝi efektiviĝu, ĉar, en efektivo, estas multaj novaj esperantistoj, kiuj unue, interesiĝas je la tuta historio de nia lingvo de la komenco ĝis nun (tion ĉi oni povas atingi nur per legado de la antaŭaj gazetoj), kaj due, ili simple ne havas sufiĉon da materialo por praktikiĝi en la lingvo, se ili ne havas la "Esperantiston".

Mi diras, ke tio ĉi estas eĉ bezonego. Se tiu ĉi projekto efektiviĝos kaj oni eksciigos en la gazeto pri la intencata preso, mi tuj sendos monon por ĉiuj jarkolektoj.

Kun saluto kaj estimo

B. Spektor,

abonanto de la gazeto.

* * *

Propono de s-ro A. Z., ke la gazeto eliradu pli ofte, estas de mi plene aprobata, tial, ke pli ofta aperado de la gazeto pli vive subtenas ligilon inter l' abonantoj. Krom tio, se iu ekvolus aboni la gazeton por urbaj bibliotekoj, legejoj k. t. p., li sciis, ke lia abono alportus al nia afero pli multe da utilo, en la lasta okazo, ĉar ofta ricevado de la gazeto farus, ke ĝi estus pli konata, ol kiam ĝi estas ricevata post longa tempo. Kelkaj miaj konatoj ne volas plu aboni la gazeton tial ke ili perdis intereson legadi malnovaĵojn kaj unu post la alia post longa tempo.

La amplekso ne ludas la ĉefan rolon, sed tre multaj pli multe konsentas tralegi mallongan gazeton ol longan artikolon. Estus tre dezirinda ke la gazeto estu pli malgranda, eĉ el 4 paĝoj, sed ĝi eliradu ĉiusemajne, aŭ je la 1, 11 kaj 21 de monato.

Se ni kalkulas ke la transsendo kostas proksimume po 2 kop. por ĉiu fojo, kune 24 kop., sekve restas por la kosto de 192 paĝoj = 1 r. 36 kop. — paĝo modesta — kaj se ni sendadus la gazeton tiel: la 1:an en amplekso de 8 paĝoj kaj la 11 kaj 21:an po 4 paĝoj, t. e. 36 fojoj dum jaro ni devas pligrandigi l' abonpagon je $24 \times 2 = 48$ kop., kaj kune = 2 rubloj.

Mi kredas ke nek laboro, nek elspezoj pligrandiĝos. krom la laboro de dissendado sed tiun ĉi laboron povas faradi ĉiujn, eĉ knabo.

Mi, de si mem, alportas al la redakcio la plej koran dankon por ĝia tre energia laboro, kaj denove petegas ke ĝi volu kaj plenumu la plej oftan aperadon de la gazeto.

Kun estimo

A. Pesockij.

* * *

En la N:o 8—9 de la "L. I." por la pasinta jaro mi proponis al la sinjoroj agentoj noti nian unujaran ekzistadon, aranĝante la Societon de Agentoj. Sed, bedaŭrinde, mia propono ne plaĉis al niaj propagandistoj, krom s-ro Ŝmurlo kaj Slucki, kaj tiel ĝi ne efektiviĝis. Nun do mi nur volas diri unun, ke se mia projekto aranĝi la agentaron, ne plaĉas al niaj amikoj, ni tiam devas trarigardi bone la artikolon de la estimata s-ro Rakitski (vidu la lastan numeron por la pasinta jaro: "Kiel aranĝi la propagandon de nia lingvo") kaj organizi la propagandan komitaton, similan al la komitato, pri kiu parolas s-ro Rakitski en sia artikolo.

Ni devas ion aranĝi, ĉar laborante malkune, ni atingas malpli da sukcesoj, sed kunigitaj en unu "tuto", ni multe pli alportos utilon al la lingvo Esperanto, ol nun. — Tiu ĉi estas mia lasta vorto! —

Kredeble multaj el la agentoj, dezirus havi la fotografiaĵojn de siaj amikoj-agentoj: kaj tial mi decidis plenumi tion ĉi, kaj aranĝi fotografian grupon de la agentoj de la lingvo Esperanto, kaj en tia okazo mi min turnas al ĉiuj agentoj kun peto, ke kiu volas partopreni en tiu ĉi grupo, volu sendi al mi sian fotografiaĵon.

Kiam mi ricevos la fotografiaĵojn de ĉiuj dezirintaj, mi el tiuj ĉi fotografiaĵoj, mendas la grupojn, kiujn povas ricevi por malmulta pago (ĉirkaŭ kvar aŭ kvin rubloj) ĉiu sendinta la fotografiaĵon. Ĉiu grupo, eble, estos enmetita en bela kadreto.

La fotografiaĵoj devas esti senditaj ĝis la unua Aŭgusto (malnova stile).

Pri la detaloj volu turni rekte al mi. Esperante, ke tiu ĉi propono plaĉos al la sinjoroj agentoj mi restas, kun saluto internacia, agento de la lingvo Esperanto,

Aleksandro Zakrjĵevski.

Mia adreso: (Rusujo.) Urbo: Smolensk. Strato: Oficerskaja Sloboda. Domo de Erdeli.

Informejo de esperantistoj.

Agentoj de Esperanto.

Anstataŭ s-ro Dembski (vidu paĝ. 191 de la N:o 12 por la pasinta jaro) helpanto de la Smolenska agento estas s-ro Paul Blajeviĉ. (Adr. Rusië, Smolensk, Klasiĉeska gimnazia uĉeniku VIII klasa).

Al la Esperantistoj.

Mi tre petas amikojn kaj amikinojn de nia kara lingvo, kiuj en tiu ĉi somero veturos en Rusujon, ke ili volu viziti ankaŭ min. Mi petas ankaŭ, ke ili antaŭe sciigu min per leteroj aŭ per telegramo.

Aleksandro Zakrjevski.

Korespondadi kun esperantistoj de ĉiuj landoj deziras la esperanta agento d-ro *Bogdanoff*, en *Sofia*. Bulgarujo.

Deziras korespondadi kun esperantistoj: *Paŭlo Lengyel*, en *Szegzard*, Hungarujo. — Adreso hungare: T. *Lengyel Pál* úrnak, nyomda-tulajdonos, *Szegzard* (Magyarorszag, — Hungaria).

ANONCOJ.

La gazeton **Lingvo Internacia** oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Hispanujo** ĉe A. Serapio, Pontevedra, *Silleda*.
- „ **Portugalujo** ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Jamskaja, 92, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.

En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

Moskva Esperantista Rondeto

invitas Moskvaajn kaj aliajn esperantistojn kaj ĉiujn, kiuj konsentas al progresado kaj disvastigado de la lingvo internacia Esperanto, fariĝi membro de tiu ĉi Rondeto. Oni povas esti membro efektiva kaj membro korespondanto. Membra jarpago 1 rublo. La rondeto donas al siaj membroj eblecon korespondadi kun amikoj de nia lingvo, korektigas iliajn provojn en Esperanto, donas ĉiujn necesajn informojn kaj posedas sufiĉe grandan bibliotekon.

Adreso: **Moskvo**, Mjasnickaja d. Staŝejev.

Prezidanto: **V. Fedorovski.**

Sekretario: **Henri Tastevin.**

Juna franca fraŭlino (20 jaroj) serĉas lokon de privata instruistino (sed nur en Rusujo); scias tre bone francan, germanan lingvon kaj esperanton.

Detalojn oni povas sciigi ĉe agento de l' Esperanto **Aleksandro Zakrjevski** en Smolensk (Rusujo).

En Rusujo, gub. de Nijnij-Novgorod, 40 verstojn de la rivero Volga,

oni vendas

7000 desatinojn da tero, en tiu nombro 8000 desatinojn da kverkaro, taŭga por ekspluatado. Kosto: unu miliono kvarcent miloj da rubloj. Por informoj oni sin turnu: **Moskva, Mjasnickaja, Magazeno de semoj de Miĥ. Ivan. Fedorovski.**

Juna homo (20 jaroj, pola) serĉas lokon de guvernanto, aŭ doma instruisto. Parolas ruse, pole kaj esperante. Scias teorie francan kaj latinan lingvojn. Povas veturi ankaŭ en la eksterlando.

Detalojn oni povas sciigi ĉe agento de l' Esperanto **Aleksandro Zakrjevski** en Smolensk (Rusujo).

Novaj eldonoj de la Klubo Esperantista en Uppsala.

I. **Esperantisk-svensk ordbok — Vortaro Esperanto-sveda** de P. Nylén. Kosto Kr. 0,75; Fr. 1,10.

II. **Lärobok med exempel och öfningar — Lernolibro kun ekzercaro por svedoj.** De Paul Nylén. Nova eldono trarigardita kaj plibonigita. Kosto Kr. 0,40.

La aĉetanto de kelkaj ekzempleroj ricevas rabaton. Ĉiujn vendatajn librojn esperantajn oni povas mendi ĉe

Klubo Esperantista, Uppsala.

La franca **Société pour la propagation de l' Esperanto** eldonas ĉiumonatan gazeton

L' Espérantiste,

kiu estas presata en franca kaj esperanta lingvo kaj havas la celon disvastigi kaj propagandi la lingvon Esperanto inter ĉiuj francoj kaj france parolantaj alilandanoj.

Sendante jarpagon de 5 frankoj al la sekretario-kasisto s-ro René Lemaire oni ricevas la gazeton kaj estas enskribita kiel membro-propagandisto en la **Societo por la propagando de Esperanto.** Adreso: Epernay (Marne), Francujo.

Por Esperantistoj

la granda ĉiutaga belga gazeto **Le Petit Bleu** (en Bruxelles) malfermis apartan abonon de sia ĉiusemajna dimanĉa eldono, kiu ĉiam enhavas esperantan tekston kun franca traduko. La abonpago (rig. pĝ 53 de tiu ĉi n-ro!) devas esti sendita al la Redakeio de "Le Petit Bleu", 17 Rue des Sables, Bruxelles.

Al niaj legantoj.

Ni petas ĉiujn niajn legantojn observi la sekvantajn:

Ĉio tuŝanta la enhavon de nia gazeto, t. e. artikolojn, noticojn, leterojn pri la esperanta movado k. e., oni volu alsendi al ni nur sub la adreso **Redakeio de l' gazeto Lingvo Internacia, Uppsala** aŭ **Redaktoro de "L. I.", s-ro Paul Nylén, Uppsala.**

Ĉio tuŝanta la abonadon, dissendadon kaj pagadon de nia gazeto, sekve abonojn, abonpagojn, donacojn, plendojn kaj proponojn pri dissendado k., e. oni volu alsendi al la **Kasisto de l' Klubo Esperantista, s-ro A. Sandborg, Uppsala** aŭ nur simple **Klubo Esperantista, Uppsala.**

Enhavo de tiu ĉi numero.

	paĝo		paĝo
<i>Hungarujo estas nia</i> , de P. N—n	49	<i>El Heine</i> , de A. Kofman	58
<i>El Belgujo</i> , de Ed. Blanjean	51	<i>Pri traduko de la Sankta Skribo</i> , de K. O. Seanbom	59
<i>Novaĵoj</i> ("Espero", Stokholma Klubo k. e.).	54	<i>La Provizoro</i> , de J. Socha (trad.)	59
<i>Esperantistoj-koresp.</i>	57	<i>De niaj abonantoj</i>	61
<i>Japana Bonveno-Societo Kihinkwai</i> , de V. Sh.	57	<i>Informejo</i>	63
		<i>Anoncoj</i>	63